



**1(169)  
2019**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Anna Frajlich

trad. Lidia Ligęza

## Ewa

Najpierw dałam ci jabłko  
wahaleś się chwilę  
nim je ostrożnie wzięleś w adamowe ręce  
tak poznałeś pragnienie – ten ból  
bez którego nie umiałbyś ulepić garnka  
z czarnej gliny  
potem  
mnie gdzieś kochałeś pod grecką kolumną  
była noc albo ranek – my  
nadzy oboje i twoje ciało wonnym  
pachnące olejem i twój pot  
i twój oddech ten sam dziś i wtedy...  
Może chciałeś zapomnieć o mej gładkiej  
skórze jak gdyby to był traktat  
o istnieniu Boga i poraniłeś plecy  
i leżałeś krzyżem

Jakże cię potem długo leczyłam ziołami...

## Zajęcie

Szukam cię w tobie nieustannie  
w krokach uśmiechach zamyśleniu  
gdzie jesteś? – w głosie  
czy w milczeniu  
gdzie bardziej – przy mnie  
czy przy sobie  
a może w wierszach innych kobiet

krokusy w mrok wtuliły głowy  
i nie czekają na odpowiedź

gdzie jesteś?  
w głosie czy w milczeniu  
gdzie bardziej?  
przy mnie czy przy sobie

## Eva

Antaŭe mi donis al vi pomon  
vi hezitis dum momento  
antaŭ ol singarde ĝin prenis en la adamajn manojn  
tiel vi ekkonis avidon – ĉi doloron  
sen kiu vi ne scipovus modli poton  
el nigra argilo  
poste  
vi min ie amis sub greka kolono  
estis nokto aŭ mateno – ni  
nudaj ambaŭ kaj via korpo per aroma  
odoranta oleo kaj via ŝvito  
kaj via spiro la sama hodiaŭ kaj tiam...  
Eble vi volis forgesi pri mia glata  
haŭto kvazaŭ ĝi estus traktato  
pri esto de Dio kaj vi vundis la dorson  
kaj krucforme kuŝis

Kile mi vin poste longe kura cis per herboj...

## Okupo

Serĉas mi vin en vi senĉese  
en paŝoj ridoj pens-koncentro  
kie vi estas? – en la voĉo  
aŭ en silento  
kie pli – ĉe mi  
aŭ ĉe via memo  
kaj eble en de fremda in' poemo

krokusoj en krepusko dronas  
kaj ne atendas la respondon

kie vi estas?  
en la voĉo aŭ silento  
kie pli?  
ĉe mi aŭ en la pens-koncentro

## Artaj kaj sciencaj ligoj inter Pollando kaj Albanio

Aprile, 2012 j. kvaropo de esperantistoj Tomasz Chmielik, Jolanta Kieres, Lidia Ligeza kaj mi vizitis Albanion okaze de tre grava evento. Aperis tiam traduko esperanten de libro "Hunda haŭto", kies aŭtoro estas Tomasz Chmielik. Nehazarde nia kolego elektis libron de vivanta nun en Usono elstara albana verkisto Fatos Kongoli. Lige kun ĉi tiu evento okazis vera, internacia solenaĵo, en kiu partoprenis la aŭtoro mem.

En Albanio la esperanta traduko tradicias ekde 80 jaroj kaj la unua esperantisto konata estas Dom Lazer Shantoja, kiun la komunisma reĝimo misfamigis, eĉ pafmortigis en junio 1945. Fatos Kongoli, Ismail Kadare kaj poetoj Luljeta Lleshanaku kaj Ekrem Basha estas konsentintaj, ke iliaj verkoj tradukiĝu en Esperanto. Preta estas poezi-volumo de Luljeta Lleshanaku, kiun tradukis Tomasz Chmielik.

Malgraŭ la konservativaj sintenoj kaj politikaj obstakloj la tutmonda Esperanto organizaĵo konsideras ĉi lingvon tute ne danĝera, kontraŭe protektiva por la naciaj lingvoj.

Fatos Kongoli sentis sin surprizita, kiam Tomasz Chmielik proponis traduki esperanten lian faman libron. Li ne ĝisfine kredis, ke Esperanto estas entute matura por redoni ĉiujn nuancojn de pensoj kaj sentoj. La tradukanto motivigas sian decidon jene: Ĉi romanon mi tralegis en la pola kaj, por mi estis vera surprizo kiam mi konstatis, ke Albanio kaj Pollando ege similis rilate la spertojn de nia generacio post la falo de la komunisma reĝimo. Ambaŭ popoloj same pensas, amas, sentas. Sed ĉi tiu romano estis interesa ankaŭ el alia vidpunkto. En la pola beletro nur nun oni komencis pritrakti la temojn de la pasinto kaj per ĉi tiu libro Fatos Kongoli antaŭiris al ĉi temaro alie ol niaj verkistoj.

En multaj kulturaj lokoj ni havis okazon ĝui pri favora atmosfero por Esperanto.

La promociigo de "Hunda Haŭto" okazis en Akademio de Sciencoj, kie ariĝis krom esperantistoj el Albanio, Pollando, Svedio kaj Latvio, ankaŭ historiistoj de la beletro, politikistoj kaj geamikoj de la verkisto mem. Almenaŭ 10 el la albanaj tagĵurnaloj de la ĉefurbo kaj pluraj televido informis pri la solenaĵo okazinta en Akademio de Sciencoj por la eldono ankaŭ en Esperanto de la verko de ties membro Fatos Kongoli.

En Tirana Universitato (Filologia Fakultato) okazis renkonto kun preskaŭ centdeka grupo de studentoj. Bardyl Selimi – profesoro pri matematiko kaj esperantisto faris prelegeton pri lingvo Esperanto kaj ebleco studi ĝin. Jolanta Kieres havis efikan lecionon de Esperanto per senpera metodo. La tuta studenta grupo amuzis povante tuj kompreni la intencojn de la instruanto.

La TV Albanian Screen (kurte AS) elsendis 50 minutan intervjuadon kun grupo de 5 esperantistoj: unu albana kaj kvar fremdaj (i.a. Elzbieta Karczewska kaj Tomasz Chmielik) pri la esperanta kulturo kaj internaciaj kontaktoj pere de Esperanto.

Post la reveno al Krakovo mi raportis pri la albana aranĝo al mia frato Zbigniew. Li tiam laboris i.a. ĉe libro pri la polaj artistoj distingitaj en la Olimpikaj Ludoj antaŭ II mondmilito. Li bezonis pli detalajn informojn pri la pola artistino Janina Kaczkowska-Luarasi, olimpika ĉampionino en la Ludoj de Amsterdamo, 1928. Ŝi edziniĝis al s-ro Thoma Kristo Luarasi el Albanio en la j. 1934. S-ino Janina estis studinta en la Universitato de Belaj Artoj en Varsovio dum la jaroj 1928-1932. Por sia diplomlaboraĵo ŝi vojaĝis tra kelkaj landoj de Mediteraneo, kie, plej verŝajne konatiĝis kun la albana diplomato, s-ro Thoma. Ili interamiĝis kaj ŝi decidis pasigi sian pluan vivon en Albanio, ekde la jaro 1934. S-ro Thoma invitis ankaŭ ŝian patrinon kunvivi en Albanio. Tie naskiĝis filo, Genci. Lian edukiĝon forte influis la avino. Poste li fariĝis unu el la plej kapablaj inĝenieroj kaj profesoroj de kemio enlande. Janina forpasis en la jaro 1995, Thoma forpasis en la jaro 1986.

En Pollando nenie estis reproduktaĵo aŭ foto de la konkursa laboraĵo "Skianto" kaj fotoportreto de la artistino. Ilin havis nur ŝia filo Genci Luarasi. Pro tio mia frato petis min ligi kontakton kun s-ro Genci, kiu laboris en Tirana Universitato. Danke al Esperanto tio estis ebla.

Mi petis s-ron Bardhyl Selimi kontaktigi nin kun la kolego el la sama universitato. Pli frue ili ne konis sin reciproke. Tiamaniere mia frato ricevis necesajn informojn kaj deziratajn objektojn. Ili estis utiligitaj en lia libro "Polaj artistoj en olimpikaj konkursoj de arto", Krakovo, 2017.

Favoraj kontaktoj de ambaŭ sinjoroj daŭris dum kelkaj jaroj, ankaŭ personaj. Mi kun Genci kontaktiĝis kelkfoje per reto.

Kun granda bedaŭro ni eksciis pri la morto de s-ro Genci Luarasi la 17-an de januaro 2019 j.

## **Pruvo de la plej alta agnosko**

Post tri jaroj, ok monatoj kaj dek kvar tagoj de diversaj provoj, mi kuraĝis inviti sep plej respektindajn gildajn majstrojn kun mia neforgesebla bonfaranto, edukanto kaj majstro Matz Grophius ĉefronte.

La edzinon mi ekspedis al la patrino, por ke per sia babilemo kaj beleco ŝi ĝenus neinun kaj en nenio. Nek al ili, saĝaj olduloj, nek al mi la plej juna el la majstroj.

Ĉe malvarmaj viandaĵoj kaj plenaj kruĉoj mi atendis, por ke la sep Grandaj kaj Inteligentaj Saĝuloj pritaksu kaj agnosku la prototipon de la nova teksilo laŭ mia ideo kaj realigo. Ili pritaksadis kaj agnoskadis ĝin kun konsidero granda, kun granda atento.

Mi do ne seniluziiĝis pro ilia majstra kono de la temo. Multe pli frue ol mi povus supozi, la majstroj pridonacis min per la pruvo de la plej alta agnosko. Konstatinte do, ke la eksterordinara lerteco kaj efikeco de mia teksilo ĝis tia grado povas faciligi, pliigi kaj kvalite plibonigi la produktadon, ke kolapsos ne nur monopolo kaj nivelo de la prezoj, sed ankaŭ devo de majstroverkoj, metilernantaj migradoj kaj de gildstrukturoj ĝenerale – anticipe ili fordrinkis por mia honoro.

Ne alie!

Antaŭe, kun larmoj en la okuloj, ili plenumis toston por la savo de mia juna animo. Poste kvar el miaj gastoj frakasis la teksilon je raspajoj, splitoj kaj pecaĉoj. La aliaj gastoj, la plej fortikaj kaj viglaj, por eviti troajn kverelojn, polemikojn kaj ĝemojn sufokis min, eĉ ne tro dolore, per bele ornamita zono de la majstro Grophius mem.

## **Famo**

Dum la tagiĝo de la bela tago mi eksidis sur la eta ŝtupo de la malgranda templo. Mi apogis la dorson je la. La senbotaj piedplatoj mi etendigis antaŭen, por kiel ĉiutage mediti kviete pri sia sennoma, ekstreme pacienca kaj serena vivo.

Mi, Takeo, la posteulo de princo Hidyoshi, ne provis reakiri la restaĵojn de la perditaj kamparoj. Mi ne deziris gajni iun posedaĵon, nek edzino, eĉ nek infanoj.

Mi, Takeo, la lasta posteulo de generalo Hideyoshi, restaŭrulo de la unueco en la moderna imperio, nur inkliniĝis al unu afero: la almozula bovleto el arĝenta pino. Ĝi ĝuste alkondukis min tiun tagon al ĉi tiun lokon. La bovleto pleniĝis rapide, mi manĝis, mi ekdormetis mallonge. Kiam mi malfermis la okulojn, mi rigardis supren al la ĉielo. Mi ekridetis: Kie oni povas trovi tian diafanon de la ĉieloj?

Kaj ĵus alflugadis aviadilo, tiel en ĉi tiu blua diafano, flagranta kiel malsata libelo super la lageto. Mi ekridetis. En neniun tamen mezuro mi povis antaŭvidi, ke pro ĉi tiu "libelo" post momento mi gajnos famon nekompareble pli daŭran ol iu ajn el mia prapatroj. Ŝogunoj, generaloj kaj militestroj. Mi akiris do la nomon konatan de tiu tempo al la tuta civilizita mondo. Kaj nome: Blanka Ombro de Homo de Hiroŝima.

# Orgojlo

Mizerulo, nobelaĉo sen bieno, filo de povrulo, edzo de almozulino kaj patro de lakeo kuraĝis ebrie malsekurigi la noblan sanon de mia favorata unujara ĉevalido, blanka ĉevalido post fama Fortunato kaj mia fama kaj splenda Alba Domina.

Kaj kiam oni punis lin per vipbatoj, kiam pro mia grandioza ordono oni plugis al li dorson per rimeno bone frotita per salo, anstataŭ sobriĝi kaj humiliĝi, li petegis la helpon de la Sankta Triunuo kaj li ĝemis laŭtege, ke la nobelulo en la bieno egalas al la vojevodo.

La Sinjoro en la ĉielo estas mia atestanto, ke humileco kaj justeco estas naturaj al mia animo. Do mi ne permesis finmortigi nobelaĉon per stangoj, mi malpermesis seksperforti lian edzinon kaj mi malpermesis sendi lian filon en militservon por ĝismorta turmentado.

Ĉar graco mia rajdas sur blanka ĉevalo kaj nobla, kiel patrino de unujara ĉevalido, splenda Alba Domina. Kaj estas ĝi vere splenda, ke ekzistas en Respubliko de Ambaŭ Nacioj neniu, kune kun bufona persono de Reĝa Eminentia Moŝto, kiu ne enius al mi tiun ĉevalon, kaj ankaŭ kvaronon de miliono da animoj sklavaj, milon kvar urbojn kaj dek unu milojn da vilaĝoj, kaj ankaŭ armeon sesfoje pli grandajn ol militistaro de tuta Reĝlando.

Nun mi devas konfesi, ke mi eraris promesante al la nobelaĉo la gracon. Mi ordonis, por oni alportu lin al mi, por kisante mian ŝuon, li malkaŝu al homoj, kiu li estas kaj kiu estas li. Estis ĝi venene satana subflustro kaj ruzaĵo. Ĉar kiam oni ĵetis nobelaĉon sub miajn piedojn, miajn, ĉe mia korteganaro li kuraĝis ne al boto alfali, sed al mia mano. En sia senekzempla orgojlo Manon Mian li volis kisi, kvazaŭ ĝi estus la mano de la patro, ne de la sinjoro. Forportis min kolero, sango ekzumis en la oreloj, miajn tempiojn ampleksis dorna krono, kaj en la koro piedbatis min Ombro de Blanka Damo kaj mi foriris al miaj prapatroj ne reakirinte la konscion.

Mi diras al vi: Murdis min la vana gloro. Orgojlo.

tradukis: *Marta Michałowska*

## Krakova Societo ESPERANTO

### La programo de la renkontoj 2019 j.

**10. 01. 2019 j.** – Kluba renkonto ĉe oblato kaj esperantaj kantikoj.

**17. 01. 2019 j.** – Alicja Sacha. **Mia koresponda amikeco kun Kayoko Takenaka el Japanio.**

**24. 01. 2019 j.** – Grażyna Porada. **Artaj kaj sciencaj ligoj inter Pollando kaj Albanio.**

**31. 01. 2019 j.** – Marta Michałowska. **Du etrakontoj de J. Broszkiewicz „Famo” kaj „Orgojlo”**

**7. 02. 2019 j.** – Grażyna Porada. **Esperantaj lingvaj ludoj.**

**14. 02. 2019 j.** – Lidia Ligęza. **La multsignifa arbusteto visko.**

**21. 02. 2019 j.** – Marta Michałowska. **Etrakonto de J. Broszkiewicz „Modelo de fenomenoj hazardaj”.**

**28. 02. 2019 j.** – Anna Ramza. **Krakovaj legendoj fare de Lidia Ligęza.**